

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1110 (37/2021)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Disvastigu!	2
- Mesaĝo de UEA okaze de la Tradukada Tago 2021	2
- Eŭropa kampanjo	4
- Forumo pri instruado	5
- Esami a Pisa	5
- Karavane	5
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton	7

DISVASTIGU EN ĈIUJ VIAJ SOCI-FORUMOJ!



esperanto

lingua internazionale parlata in tutto il mondo

logica

di veloce apprendimento

equa

Corso online gratuito

15 lezioni di 90 minuti

Sufficienti per una comunicazione di base

Inizio corsi NOVEMBRE

Per informazioni e orari scrivere a:

corsi@esperanto.it

Una lezione a settimana, orario e giorni da concordare con il centro unico iscrizioni. Insegnanti su tutto il territorio nazionale

MESAĜO DE UEA OKAZE DE INTERNACIA TRADUKADA TAGO 2021

La 30-a de septembro estas la Internacia Tago de Tradukado, kiam Unuiĝintaj Nacioj honoras tradukistojn kaj interpretistojn tra la mondo, esprimante subtenon al ilia grava sed ofte nevidebla, aŭ eĉ mistraktata, laboro de transportado de la lingvoj de la mondo.

Lingvoj gravas ĉar homoj bezonas kompreni kaj esti komprenataj. Ili gravas por ke neniu restu forlasita, por ke ni ĉiuj parolu kune kaj auskultu ĉiujn. Ili gravas por ke ĉiuj havu voĉon en konstruado de pli bona mondo. Sed sen transportado inter la diversaj lokaj kaj naciaj lingvoj, lingvoj povas tro facile apartigi kaj izoli la homojn. Tradukado kaj interpretado estas esenca laboro por unuigi naciojn kaj alproksimigi homojn -- kaj por faciligi dialogon, komprenon kaj kunlaboron.

Lingvoj havas fundamentan rolon en kultura diverseco, interkultura dialogo kaj edukado. Per lingvoj, ni povas plifortigi kunlaboradon, konstrui pli inkluzivajn sociojn, konservi kulturen heredaĵon kaj kunvoki politikajn volojn. Sed ĉio ĉi povas okazi nur se okazas dialogo ankaŭ trans lingvaj diferencoj.

Multlingveco estas kerna valoro por Unuiĝintaj Nacioj. Ni aparte bonvenigas la klopodojn de la Ĝenerala Sekretario António Guterres por antaŭenigi multlingvecon en UN. Sed ankoraŭ restas longa vojo. Tion montras la Raporto de la Komuna Inspekta Unuo pri multlingveco en la sistemo de UN (2020). Laŭ la raporto, ankoraŭ mankas kohera penso pri multlingveco, sistemaj iniciatoj, strategioj kaj planoj, por subteni multlingvecon kiel fundamentan valoron.

Universala Esperanto-Asocio, utiligante la Internacian Lingvon Esperanto, jam partoprenas plene internacian dialogon inter niaj membroj kaj kunlaborantaj organizoj tra la tuta mondo. Ni estas ankaŭ tre konsciaj pri la misuzo de lingvoj por ekskludi, por mise diskriminacii kaj por apartigi la homojn. Tiuj, kiuj laboras por detruu tiujn barojn estas memevidente niaj aliancanoj en la strebado por trovi la komunan grundon, kie en paco kaj konfido ni povu urĝe fronti kaj superi la problemojn de nia fragila planedo.

MULTAJ OPINIAS, KE TRADUKI, EĈ DE KAJ/AŬ AL ESPERANTO, ESTAS IO SIMPLA, ATINGEBLA FAR ĈIUJ (AŬ PRESKAŬ). MIAOPINIE, TIU AGO MULTE PLI SIMILAS STREĈIGAN SPORTON, KIEL:

- LONGDISTANCA KURO: kiu ajn kapablas marŝi 2/3 kilometrojn, sed por finkuri maratonon nepras pretigado, spiro, trejnitaj kruroj kaj ĉefe multe da cerbo:
- LIBERA LUKTO: devas esti ĝuebla sed, samtempe, ne permesi al vi rekoni la amason da laboro kiu kaŝiĝas malantaŭe, por ke ĝi estu kiel eble plej bela. Tiuj, kiu ne komprenas tion, ofte asertas "Mi mem kapablas fari ion tian!";
- KOREOGRAFIA DANCO: kiam oni starigas koreografion, ĝis la lasta sekundo oni strebas poluri plej etajn detalojn antaŭ la surscenigo. Ĉiu pozicio, ĉiu linio: oni strebas al absoluta perfekteco. Oni neniam sin sentas tute pretaj. Sed jen, la spektaklo komenciĝas, kaj... kia memkontento!
- MONTOGRIMPADO: ĉiuj iras al la montaro, kaj kredas ĝin koni, sed kelkaj agas malprudente, kaj subtaksas la riskojn. Ni diru ke, inter tiuj kiuj iras

sur glaĉeron kun sandaloj, kaj montgvidistoj estas abismo (en kiun kelkaj falas).

- KARATEO: ĉiu movo devas esti kalkulata, preciza, ekzakta. Nur per grandaj disciplino kaj praktiko la rezulto estos harmonia kaj efika.

EŬROPA KAMPANJO

Karaj estraranoj de landaj kaj regionaj Esperanto-asocioj kaj de lokaj grupoj en Eŭropo,

la Eŭropa Unio faras ion, kion ĝi ĝis nun neniam faris, kiel bone atentigis Ursula Niesert el Freiburg: Ĝi demandas siajn civitanojn pri iliaj ideoj por la estonteco - kaj ne simple faras kion politikistoj kaj ŝtataj dungitoj elpensis. En deko da temaroj ni civitanoj povas enmeti niajn proponojn - kaj pri Esperanto jam venis preskaŭ trideko da proponoj.

Nun necesas subteni tiujn proponojn per voĉdonado kaj feliĉe jam tre multaj homoj tion faris. Tamen multaj gravaj proponoj havas ĝis nun nur kelkajn dekojn da voĉoj, centon aŭ, maksimume, iom sub kvarcent. En du temaroj niaj Esperanto-proponoj estas jam ĉe la pinto, sed en aliaj ankoraŭ ne. Ni tiel riskas, ke la aliaj civitanoj, la politikistoj kaj la ĵurnalistoj pretervidas niajn proponojn.

Tial estus tre afable, se vi bonvolos plian fojon alvoki viajn membrojn ke ili bonvolu subteni la komunan kampanjon per sia voĉdonado. Certe utilas rondleteroj al ili, krome ankaŭ povas utili meti informon pri la kampanjo al via retpaĝo, vidu la ekzemplon ĉe Germana Esperanto-Asocio sur <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/esperanto-en-eu> (Esperanto-versio) kaj <https://www.esperanto.de/de/europa> (germana versio) Jen ekzemplo sur la paĝo de regiona asocio, Baden-Virtemberga Esperanto-Asocio <https://esperanto-bw.de/pages/de/landesverband/eu-zukunftskonferenz.php>

Mi konscias, ke vi eble jam aŭdis multon pri la agado...
Mi ankaŭ konscias, ke la unua registriĝo estas iom komplika kaj bezonas paciencon kaj persiston. Sed poste eblas voĉdonado por tiom da ideoj, kiom oni volas :)

Mi tre ĝojos, se vi plu subtenos la kampanjon. La varbistoj parolas pri tio, ke indas atingi la eblan klienton aŭ subtenanton almenaŭ sep fojojn por garantii maksimuman sukceson. Kaj oni diras ke la kampanjo ekfunkcias, kiam la ĉefaj agantoj jam komencas enui pri ĝi...

FORUMO PRI INSTRUADO

Aktualaj spertoj el instruado de Esperanto en lernejoj

ILEI-Forumo por instruistoj

Vendredo 8 oktobro 2021, 15:00 → 16:00 UTK

Ĉiuj estas bonvenaj!

Se vi havas tia(j)n sperto(j)n vi povos kundividi, se ne, vi povas komenti kaj/aŭ pridemandi alies spertojn.

Jen alir-informo al la Forumo (en Zoom):

<https://us02web.zoom.us/j/82905766250>

Se demandite:

Kunven-Identigilo (Meeting ID): 829 0576 6250

Pasvorto (Passcode): La nomo de nia komuna lingvo per minuskloj

ESAMI A PISA

Informo che il 17 ottobre 2021 a Pisa avranno luogo una sessione di esami di primo grado e una di secondo grado.

Se qualche vostro allievo della zona fosse interessato, fatemi sapere.

Laura Brazzabeni

Direttore Generale IIE

KARAVANE

Cari Amici, riprendiamo la nostra normale attivita' turistica ed escursionistica. Allo scopo abbiamo aggiornato il nostro sito web <http://www.karavane.net> con il programma per il Ponte di Ognissanti,

"UN BACIONE A FIRENZE" PONTE DI OGNISSANTI 2021 NELLA TOSCANA BOCCACCESCA E MEDICEA. Un viaggio interamente diurno nella Toscana Medioevale e Rinascimentale. Partiamo nel tardo pomeriggio di venerdi' 29 Ottobre 2021 pernottando fin da venerdi' sera a Firenze per guadagnare un giorno di visita e torniamo lunedì' 1°Novembre sera. Ora che è passata la pestilenza possiamo tornare a Firenze, come ci racconta di aver fatto messer Boccaccio, autore dell'opera piu' intrigante del suo tempo e forse di tutti i tempi.

Facciamo visite nella città dove il Firmamento tenta ancora di specchiarsi nell'Arno (d'argento), alle Cascine il rubacuori con il beltempo non è soltanto messer Aprile mentre nei dintorni non si aggira più il mostro che agiva esclusivamente di notte, del quale tuttavia rimane il mistero tuttora insoluto. Nel corso

del viaggio godiamo di una visione d'insieme di Firenze e cerchiamo di coglierne lo spirito e quindi di alcune delle sue meraviglie (museali e non) di cui faremo una opportuna selezione. Progettiamo comunque di visitare alcuni luoghi importanti e tuttavia meno conosciuti di Firenze (come lo Spedale degli Innocenti opera di Brunelleschi, il museo di San Marco e del Beato Angelico e la Biblioteca Laurenziana opera di Michelangelo). Fuori Firenze ci spingiamo fino alla medioevale Certaldo luogo di nascita di Boccaccio e alla vicina turrita San Gimignano dallo straordinario profilo (skyline) 'metropolitano' meglio percepibile al crepuscolo. COSTO CALCOLATO: euro 270,00 più 20 euro di spese amministrative, abbuonate a chi si iscrive, per e-mail o con sms (non per telefono o a voce) o di persona presso la sede entro Mercoledì 13 Ottobre 2021. Per partecipare, ai cittadini italiani è sufficiente avere la CARTA DI IDENTITÀ valida e il GREEN PASS (obbligatorio) non ancora scaduto. ISCRIZIONI : per questo viaggio le iscrizioni si possono fare, a partire dal 1° Ottobre, tramite E-MAIL a info@karavane.net oppure tramite SMS al 348-1709286 oppure presso la sede in via Casale 7, Milano ogni mercoledì ore 17:30-19 (telefono 348-1709286) e diventano effettive con il versamento di un anticipo. Vi invitiamo ad andare a vedere le pagine nel nostro sito web www.karavane.net

Il programma dettagliato di "un Bacione a Firenze" per Ognissanti che specifica quanto già descritto qui sopra potrete trovarlo nel nostro sito web o direttamente in www.karavane.net/ITF21c.htm

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON

